

# STARTO

**N-ro 3/2011 (240)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



Polaj kaj ĉeĥaj esperantistaj geknaboj rostan kolbasetojn  
en kampadejo Vochtánka sub Potštejn, junio 2011

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea@esperanto.cz

**Identec-numero (IĈ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marĉek: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšínkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

195 230 825 / 0300

**Poštovní spořitelna Poděbrady**

## Komitato de ĈEA:

**Prezidantino:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam.cz (reprezentado de ĈEA, kunordigado, internaj asociaj rilatoj, metodiko)

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz (internaciaj rilatoj, fakaj aplikoj de Esperanto, ĈEA-retkomunikoj, eldona agado)

**Vicprezidanto:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, Tomecek@esperanto.cz (muzeo, konferencoj, TTT, ekster-asociaj rilatoj)

**Sekretario:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz (protokolado, korespondado, rilatoj kun la banko)

**Kasistino (komitatano A de UEA):** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz, (membrobazo, kontado)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavladvorakova@tiscali.cz (kluboj, projektoj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec@volny.cz (sekcioj, komisionoj, lingvaj konsultoj, ciferecigado)

**Ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj UK-perantino:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828, Lucie.Karesova@seznam.cz

## Kontrolgrupo de ĈEA:

**Prezidantino:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257, dvor.libuse@seznam.cz

Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 00 Pardubice, Ludmila.Srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

**Kontrollegis:** Sabine Hauge, Pavel Polnický, la komitato.

## 96-a UK en Kopenhago

23 - 30 julio 2011

La kongresa temo **Dialogo kaj interkompreno** rilatas similan temon de la ĉijara *Internacia Jaro de la Junularo* (Dialogo kaj reciproka kompreno). La informojn pri la agado de la kongreso alportis 6 numeroj de la kongresa kuriero *Vikinga Voĉo*. La kongreson malfermis Probal Dasgupta, prezidanto de UEA.


Li substrekis gravecon de gastama arto, por Esperanto same necesa kiel la spirado, kaj bonvenigis eldonotan tradukon de vjetnama epopeo, kiu baldaŭ aperos kiel kontribuo al dialogo inter okcidento kaj oriento.

Saluton sendis ankaŭ Irina Bokova, ĝenerala direktoro de Unesko, kiu „firme intencas evoluigi kaj kreskigi la rimedojn de komunikado inter siaj popoloj kaj uzi tiujn rimedojn cele al reciproka kompreno kaj pli vereca kaj perfekta konado de la vivo de aliaj“.

Jam tradicie sendis sian saluton Louis C. Zaleski-Zamenhof, nepo de Majstro kaj grava arkitekto: „La latindevena vorto *dialogo* signifas diskuton inter du aŭ pluraj individuoj; diskuton celantan ebligi interkonsenton. Tamen ne eblas dialogi, se la dialogantoj ne komprenus unu la alian. La interkonsento ne povus esti realigata, se mankus interkompreno.“

Riĉa kongresa programo (123 programeroj) enhavis koncertojn kaj teatraĵojn (*Dek tagoj de kapitano Postnikov, Zamenhof*), fakajn kaj estrarajn kunvenojn, ekskursojn, multajn prelegojn, ne nur enkadre de Internacia Kongresa Universitato. Estis honoritaj gravuloj kaj fine akceptita la kongresa rezolucio. Venis 1458 kongresanoj el 66 landoj.

## Tri novaj Honoraj Membroj de UEA



**Detlev Blanke** (nask. 1941) estis sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR 1968-1980 kaj ekde 1981 de Esperanto-Asocio de GDR. Li doktoriĝis en 1976

per disertacio pri kompara vortfarado de Esperanto kaj la germana, kaj habilitiĝis en 1985 per disertacio pri planlingvoj (*Internationale Plansprachen*). En 1988 li fariĝis docento pri interlingvistiko en la Berlina Humboldt-Universitato. Ekde 1976 li estas estrarano de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), kies bultenon *Informilo por Interlingvistoj* li redaktas ekde 1992. Ekde 1992 li kompilas (kun H. Tonkin) bibliografion pri Esperanto kaj interlingvistiko por la usona Modern Language Association. Li iniciatis la Esperantologiajn Konferencojn, kiuj okazas ekde 1978 en ĉiu UK. Kun sia edzino Wera li laboras i.a. pri terminologio kaj iniciatis la fondon de Terminologia Esperanto-Centro de UEA en 1987.

**Renato Corsetti** (nask. 1941) laboris dum la unua parto de sia vivo en banko kaj poste en la Universitato de Romo. Li estas aktiva en la Esperanto-movado de la fino de la 1960-aj jaroj. Prezidanto de TEJO li estis 1971-1973, poste honora prezidanto. Li estis estrarano de UEA 1980-1986, vicprezidanto 1998-2001 kaj prezidanto 2001-2007.





Corsetti membris en multaj komisionoj de UEA kaj estis prezidanto 1980-1986 kaj vicprezidanto ekde 2002 de Instituto Hodler '68. Estrarano kaj prezidanto de Itala Esperanto-Federacio li estis dum pluraj periodoj. Membro kaj sekretario de la Akademio de Esperanto li estas ekde 1999. En 2008 li ricevis la Premion Deguĉi. Li aŭtoris aŭ redaktis multajn librojn kaj artikolojn. En sia agado li aparte interesiĝas pri la disvastigo de Esperanto al ĉiuj kontinentoj kaj pri ĝia utiligo por certigi la lingvajn homajn rajtojn je ĉiu nivelo.

**Rob Moerbeek** (nask. 1936) laboris 32 jarojn kiel oficisto de UEA zorgante pri la ekspedofako de la Centra Oficejo kaj



pri provlegado de *Esperanto* k.a. periodaĵoj kaj eldonaĵoj de UEA. Li prizorgis ankaŭ la Bibliotekon Hodler kaj la arkivon de la CO. Post emeritiĝo en 2001 li laboras volontule en la CO. Li korektas ankaŭ la revuojn *Monato*, *Internacia Pedagogia Revuo*, *Scienca Revuo*, *Fen-x* (E-o Nederland), *E-ista Vegetarano*, *La Kontakto* (nederlanda LIBE-sekcio), k.a. Agado por handikapuloj, precipe blinduloj, estas proksima al li. Li prizorgas voĉlegadon de *Esperanto* k.a. revuoj por blinduloj. Ekde 2001 li reprezentas Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj en la Komitato de UEA. Li estis privatdocento pri E-o ĉe la Universitato de Amsterdamo 1978-1998. En 2000 li ricevis la Premion Deguĉi.

*Laŭ Gazetaraj komunikoj de UEA  
Fotoj el arkivo de KAVA-PECH*

## KONGRESA REZOLUCIO

Ni, la partoprenantoj en la 96-a Univerŝala Kongreso de Esperanto, venintaj al Kopenhago el 66 landoj por komune dialogi pri la iniciato kiun UN lanĉis per la proklamo de Internacia Jaro de la Junularo,

*efektiviginte* multvidpuktan diskutadon pri tiu temo, en etoso de interkomprenemo kaj efika komunikado,

*ĉerpinte* el niaj unuopaj kaj kolektivaj spertoj kiel anoj de diversaj socioj, aĝogrupoj, etnoj, seksoj, mondbildoj, politikaj sintenoj kaj religiaj konvinkoj,

*agnoskinte* la kontribuojn de la junularo al la socio kaj la neceson malfermi ŝancojn por ĝia partopreno en la kolektivaj decidoprocezoj, por taŭge alfronti la diversajn defiojn kaj ŝancojn de la nuna realo – sociekonomiajn, ekologiajn, politikajn, teknologiajn ktp. – cele al la estonteco de la homaro kaj la planedo,

*konstatinte* ke tra la epokoj kaj kulturoj, la diversaj generacioj rilatis inter si laŭ variaj modeloj kaj strategioj, kun foja estiĝo de aparta junulara kulturo, kaj ke en la Esperanto-movado mem tio esprimiĝis ekz. per la efike avangarda rolo plenumita de ties junulara branĉo en apartaj historiaj turnopunktoj,

*rekomendas* ke la unuopaj organizaj instancoj kaj sociaj medioj de la Esperantaj movado kaj komunumo aktive strebu al la kreado de taŭgaj kondiĉoj por kontakto, alproksimiĝo kaj kunlaborado inter junuloj kaj aliaĝuloj, ke la anoj de la malsimilaj aĝogrupoj en Esperantujo iĝu pli konsciaj pri la potencialo kiun por intergeneracie kontentigaj rilatoj liveras la esperantisma ideo mem de reciproka respekto kaj ambaŭdirekta bona volo,



*alvokas* al UEA, TEJO kaj iliaj respektivaj landaj organizoj pliproksimigi tempe kaj geografie siajn kongresojn, same internaciajn kiel landajn kaj regionajn, per kunordigita decidado, al konkretaj paŝoj ĉiunivele por kunagigi esperantistojn rete kaj eksterrete agantajn, same por enmovadigi perretajn lernintojn de la lingvo, kiel por helpi la tradician movadon adaptiĝi al la nuna epoko.

*Kopenhago, 30 julio 2011*

## BELARTAJ KONKURSOJ EN 2011

### POEZIO

**Unua premio:** Jorge Camacho Cordón (Hispanio) pro *Sezonoj*; **Dua premio:** Ulrich Becker (Usono) pro *Adiaŭa festo*; **Tria premio:** Jorge Camacho Cordón pro *Lokoj*; **Honora mencio:** Aleksandro Mitin (Rusio) pro *Vivhorloĝo*. Partoprenis 43 verkoj de 18 aŭtoroj el 14 landoj.

### PROZO

**Unua premio:** ne aljuĝita; **Dua premio:** Sten Johansson (Svedio) pro *Brokante*; **Tria premio:** Sten Johansson pro *Nova amiko de Sinjoro Brunner*; **Honora mencio:** Ulrich Becker pro *Malapero de knabo*. Partoprenis 20 verkoj de 13 aŭtoroj el 10 landoj.

### ESEO

**Premio "Luigi Minnaja":** Davide Astori (Italio) pro *La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planado*; **Dua premio:** Jan Werner (Slovakio) pro *Konfuzigaj faktoroj en lingva komunikado*; **Tria premio:** Filippo Franceschi (Italio) pro *Post legado de "La mava lingvo"*; **Honora mencio:** Adrienne Pásztor (Hungario) pro *Tutmondaj defioj de la klimatsanĝiĝo*. Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 3 landoj

### TEATRAĴOJ

**Unua premio:** ne aljuĝita; **Dua premio:** ne aljuĝita; **Tria premio:** Doron Modan (Israelo)

pro *Justa juĝo*; **Honora mencio:** João José Mendes Quiterno dos Santos (Portugaliao) pro *Aŭtodafeo*; **Honora mencio:** Georgo Handzlik (Pollando) pro *Kompleta (preskaŭ) historio de Universalaj Kongresoj de Esperanto*. Partoprenis 8 verkoj de 8 aŭtoroj el 6 landoj.

### KANTO

**Premio "An-okin pri Kanto":** ne aljuĝita; **Dua premio:** Rogerio Borges kaj Eric Languillat (resp. muziko kaj teksto; Francio) pro *Tatua Papili'*; **Tria premio** ne aljuĝita. Partoprenis: 4 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

### FILMO

**Unua premio:** Roman Dobrzyński (Pollando) pro *Japana printempo – Oomoto 2009*; **Dua premio:** ne aljuĝita; **Tria premio:** ne aljuĝita. Partoprenis: 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

### INFANLIBRO DE LA JARO

*Avo Paŭlo*, verkita kaj eldonita de Margrit Vollertsen-Diewerge, trad. Pit Hauge (Germanio). Partoprenis 5 verkoj de 5 eldonejoj el 5 landoj.

## Sekelj kaj Vikipedio en la Malferma Tago

La 35-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 26-an de novembro atentis la februaran 100-an datrevenon de Tibor Sekelj (1912-1988), mondvojaĝanto, ĵurnalisto, verkisto kaj movada aganto, pri kies multfaceta vivo prelegos la Esperanto-verkistino Spomenka Štimec.

Alia temo de la Malferma Tago estos Vikipedio, pri kies evoluigo kaj utiligeblo parolos d-ro Ziko van Dijk. Ekde majo ĉi-jare li estas prezidanto de Wikimedia Nederland, la nederlanda filio de Fondaĵo Vikimedia kiu estras tiun ĉi liberan retan enciklopedion. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

*Laŭ Gazetaraj komunikoj de UEA*

## La 67-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO

okazis ekde la 14-a ĝis la 21-a de julio 2011 en Kievo, la ĉefurbo de Ukrainio. Partoprenis ĝin 311 esperantistoj el 34 landoj. La aranĝon organizis Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), Ukrainia Esperanto-Asocio (UkrEA) kaj Ukraina Ligo de Esperantista Junularo (ULEJ). Ĝia temo estis *Daŭropova evoluo – nova koncepto por homaro*. Temis pri la unua IJK sur la tereno de Ukrainio. Du tagojn post ĝi komenciĝis en Kopenhago la 96-a Universala Kongreso.



Origine kiel kongresejo estis planita sportejo de la Kieva Politeknika Universitato, kiu situas apud la Kieva rezervujo en la vilaĝo Hlibivka, 30 kilometrojn norde de Kievo. Poste oni decidis movi la kongresejon en la urbon Kievo mem, al la turista bazejo "Juna turisto" en strato Zabolotnoho 144. Loĝi eblis en kvarlitaj kaj kvinlitaj ĉambroj kun litaĵoj aŭ sen, unu el la amasloĝejoj, en tendoj (troviĝantaj inter la kongresejo kaj la apuda konstruaĵo de lernejo) aŭ memzorge ekster la IJK-ejoj. Manĝi eblis en la proksima restoracio.



**TEJO-estraro.** La 16-an de julio 2011 estis elektita nova estraro de TEJO: Łukasz Żebrowski (Pollando) – Prezidanto; Paulína Kožuchová (Slovakio) – Ĝenerala Sekretario; Alisa Nikitina (Ukrainio) – Kasistino; Sergeo Tyrin (Israelo) – Informado; Nico Huurman (Nederlando) – Aktivula trejnado; Petra Smidéliusz (Hungario) – Landa agado; Michael Boris Mandirola (Italio) – Eksteraj rilatoj; Tina Tišljar (Kroatio) – Kongresoj.

**Taga programo.** En la parko en Feofanio, kiu situas proksime al la kongresejo, okazis parto de la konkursoj dum la sporta tago. Ĉiu tago komenciĝis per diversnivelaĵoj de Esperanto, la ukraina lingvo kaj aliaj lingvoj. Dum la tago okazis multe da prelegoj. La 17-an de julio okazis ekskursoj tra la urbo, en malgrandaj grupoj ĉiu gvidita de alia lokano. La 18-an de julio okazis Lingva Festivalo dum kiu samtempe estis prezentataj diversaj lingvoj kaj lingvaj regionoj. La 19-an de julio estis sporta tago (inter konkursoj ne mankis futbala matĉo "Esperantio kontraŭ resto de la mondo" aŭ konkuro en naĝado; parto de la programo okazis en la parko "Feofania").

**Vespera programo.** Vendrede, la 14-an de julio, okazis koncerto de Gunnar Fischer kaj Ĵomart kaj Nataŝa. Dimanĉe, la 17-an de julio, okazis koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa kaj Paŭlo Moĵajev. Marde, la 19-an de julio okazis koncerto de La Pafklik kaj JoMo.



*Miroslav Hruška prelegas pri fervojo*

**Nokta programo.** Nokta programo, kiu sekvis la vesperan programon kaj daŭris ofte ĝis la matenaj horoj de la sekva tago, proponis elekton inter gufujo (te-trinkejo), diskejo (dancejo gvidata de Aleksej Svrtoka) kaj trinkejo, kie sub gvido de Martin Sawitzki, helpata de Miroslav Hruška kaj Karol Rydlo, eblis trinki ukrainajn bierojn aŭ senalkoholajn trinkaĵojn (ia. kvason), aŭ aĉeti ukrainan ĉokoladon "Baton".



**Rezultoj.** Aperis krom multaj fotoj ankaŭ raportoj, interalie raporto de Chuck Smith kaj reago de Carolin Weemeyer en Libera Folio, kaj raporto de Daniel Mrázek por TEJO Tutmonde.



La 14-an de julio 2011 la oficialan inaŭguron de la kongreso antaŭis renkontiĝo kun ĵurnalistoj. TEJO-n reprezentis Sergeo Tyrin, ULEJ-representanto estis Svitlana Kozarenko, la projekton Ĉirkaŭmonda Karavano Interkulturo prezentis Volodimir Soroka. Vespere aperis raporto en ukraina televido STB. La 19-an de julio 2011 okazis rekta elsendo aranĝita de Daniel Mrázek en la Ĉeĥa Radio, elŝutebla rete (la raporto pri IJK komenciĝas je tempo 7:23, finiĝas je tempo 19:32). Dum la kongreso eblis spekti interretajn elsendojn realigatajn de Japana Esperanto-Junularo.

*Laŭ Vikipedio  
Fotojn disponigis: TEJO Tutmonde*





## En Olomouc renkontiĝis blindaj esperantistoj el Eŭropo kaj Japanio

En Olomouc, en la tagoj de la 14-a ĝis la 21-a de julio 2011, estis aranĝita Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj.

La vicnumero de la kongreso estas 77 kaj ĝi estas aranĝita sur la ĉeĥa teritorio jam la trian fojon. En tiu ĉi internacia aranĝo partoprenis entute 56 gastoj el 12 landoj (Ĉeĥio, Bulgario, Finnlando, Italio, Germanio, Kroatio, Pollando, Serbio, Aŭstrio, Rusio kaj Japanio).

La patronecon super la kongreso transprenis vicestrino de la Regiona Ofico de Regiono Olomouc Mgr. Yvona Kubjátová kaj ĉefurbestro de statuta urbo Olomouc sinjoro Martin Novotný. La kongreson signife subtenis Unuiĝinta organizaĵo de nevidantoj kaj de malfortevidantoj de Ĉeĥa Respubliko, Distrikto Olomouc, Teknika Muzeo en Brno, Veolia Transport Morava, Hotel Sigma Olomouc, eldonejo Kava-Pech Dobřichovice, Biblioteko kaj Presejo por Blinduloj Praha, Urbtrafika Entrepreno de urbo Olomouc kaj TyfloCentrum Olomouc.

**Organizanto de la kongreso estis Blindulsekcio de Ĉeĥa Esperanto - Asocio.**

En hotelo Sigma okazis krom oficiala inaŭguro kaj solena fermo de la kongreso ankaŭ multaj neformalaj renkontoj de partoprenantoj, diverstemaj prelegoj inkluzive de tiu kongrestema: Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj, kaj du ĝeneralaj asembleoj de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE).

Kongresa programo enhavis vicon da vizitoj de historiaj memorindaĵoj de urbo Olomouc kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Krom aliaj tio estis vizito de historia urbodomo kaj centro de urbo Olomouc, katedralo de sankta

Venceslao kaj de ĉefdioceza muzeo, baziliko kaj zoo en Svatý Kopeček, monaĥejo fortikaĵo Klášterní Hradisko, historia armea fortikaĵo en Křelov kaj sankta meso en Esperanto en preĝejo de sankta Miĥaelo.

La partoprenantoj vizitis ankaŭ bierfarejon Moritz kaj ĉasistan kabanon en Horka nad Moravou. Unu tago estis dediĉita al prelego pri Karel Emanuel Macan, nestoro de E-movado de blinduloj ne nur en nia lando, sed ankaŭ en la mondo. La prelego okazis en Teknika Muzeo en Brno.

Estis vizitata ankaŭ centro por helpo al blinduloj en la strato I. P. Pavlov en Olomouc. La partoprenantoj tie ricevis informojn pri nivelo de subtenado de blindaj kaj malfortevidantaj homoj dum laborserĉado en distrikto Olomouc. Estis vizitebla ankaŭ vendejo de helpiloj, kiujn multaj partoprenantoj ne nur rigardis, sed ankaŭ aĉetis.

**Celo de la kongreso estis antaŭ ĉio interŝanĝo de ekkonoj pri nivelo de flego pri blindaj kaj malfortevidantaj homoj en diversaj landoj, per ekipo de kompensaj helpiloj kaj per forigado de barieroj.**

Partoprenantoj renkontiĝis kun siaj konatuloj el pasintaj kongresoj kaj ankaŭ trovis novajn kontaktojn kaj novajn amikecojn. En nelasta vico ili havis eblecon pliperfektigi en uzado de Esperanto, kiu estas tradicia komunikilo por blinduloj de la tuta mondo jam pli longe ol 100 jarojn.

Ni estimas ĉiujn institutojn kaj organizaĵojn, kiuj finance aŭ per alia maniero subtenis tiun ĉi internacian renkontiĝon. Ĝi estis sendube sukcesa kaj per sia ekkona programo certe helpis al prezentado de urbo kaj regiono Olomouc eksterlande.

*Jan Přeborský,*

*Blindulsekcio de Ĉeĥa Esperanto - Asocio*



*Inaŭguro de la kongreso*



*Unu el pluraj ekskursoj*



*Vizite en zoologia ĝardeno - la nevidantoj povis karesi plurajn bestojn danke al afableco de la bredistoj*

## **Rezolucio de la 77-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj al landaj organizoj de viddifektitoj**

Ni partoprenantoj de la 77-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazinta en Olomouc - Ĉeĥio de la 14-a ĝis la 21-a de julio 2011 traktis pri jena kongresa temo:

***"Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj"***.

Dum prelegoj kaj sekvanta diskutado ni konstatis, ke strebo al plibonigado de ebligo percepti kaj ĝui diversajn kulturajn aranĝojn kaj objektojn por viddifektitoj estas ĝenerala. Bonajn praktikajn ekzemplojn ni povis sperti dum ekskursoj en la kongresurbo, en ĝia urbodomo, en kelkaj muzeoj, preĝejoj kaj bestĝardeno.

Ni volas esprimi nian subtenon al ĉi tiuj klopodoj, ĉar ĉiam pligrandiĝanta nombro da menciitaj ebloj grave pliriĉigas la vivon de homoj kaj kontribuas al pli bonkvalita klerigado de gejunuloj.

Tial ni alvokas ĉiujn respondeculojn, ke spite al diversaj problemoj oni daŭrigu en ĉi tiuj streboj.



## Centjara datreveno de la fondo de Esperanto-klubo en Olomouc

La 14-a de marto estis la tago, kiam estis fondita antaŭ 100 jaroj Esperanto-klubo en Olomouc. Oni rememoris la gravan datrevenon en tiu tago je la 12-a horo en la Ĉeĥa Radio Olomouc, kie okazis kadre de la programo Větrník unuhora rakontado de la prezidanto de la Esperanto-sekcio de la Patrujsciencia Muzea Asocio Olomouc Jan Duda, gvidata lerte de sperta konferanseino de la radio Zora Ježková. Parto de la festo estis ankaŭ du unumonataj ekspozicioj de libroj en februaro kaj majo, en Scienc-Biblioteko. Oni prezentis 56 librojn – juvelojn de ĉeĥa kaj monda literaturoj, kaj multe da diversa materialo pri historio de la klubo kaj Esperanto entute.



Fine la 11-an de junio antaŭtagmeze okazis ĉe la memorŝtono en la Parko Bedřich Smetana solena renkontiĝo okaze de la jubileo. Partoprenis esperantistoj de diversaj kluboj kaj inter ĉefgastoj estis urbestro de Olomouc Martin Novotný, prezidantino de ĈEA Jana Melichářková kaj lingvisto PhDr Mirek Čejka, CSc, ekspedagogo de la Universitato Masaryk en Brno, filo de Theodor Čejka.

Post la programo la partoprenantoj ĝuis malgrandan ekskurson en historia tramo (aranĝis Petr Soušek), kaj konatiĝon kun fontanoj de la urbo (L. Láni).



*Pri la centjariĝo de EK Olomouc eksciis la tuta urbo per informoj sur tramoj kaj per senpaga veturo en la historia tramo.*



Je la 14:30 sekvis solena koncerto en la korto de la urbodomo. Dum la programo prezentiĝis Virĥoro Rovina kun popolkantoj de la regiono Haná, mi recitis kelkajn elektitajn poemojn de poetoj de Olomouc pri fontanoj de nia urbo kaj ludis violonon, akompanata de Mgr. Markéta Šikulová.



Eminenta akordeonisto Václav Nosek ludis ankaŭ dum koncerto, sed ĉefe post la koncerto en agrabla societo apud la fontano Arion, kie sonis violono, akordeono kaj voĉoj en Esperanto kaj ĉeĥa lingvo.



En la muziko kaj kanto finiĝis la festo de la jubileo. Por rememori ĉion, ni havas je nia dispono [www-paĝojn](http://www-paĝojn) kun multe da materialo, zorgeme prilaborita de RNDr.

Dana Šubová. Al ĉiuj, kiuj laboris, mi kore dankas.



ESPERANTO TION MERITAS.

*Jan Duda, prezidanto de la Esperanto-sekcio de la Patrujsciencia Muzea Asocio*  
23.06.2011

## Forgesita komponisto

Antaŭ la Esperanto-arbo en Olomouc parolis ankaŭ s-ro Zdeněk Smirický el Patrujsciencia Societo Žerotín-Dřevohostice. Li informis pri moravia baroka komponisto Josef Schreier (1718 – mortodato nekonata), kies paŝtista meso *Missa pastoralis in C boemica* antaŭ



nelonge trovita estas verŝajne la plej bona baroka komponaĵo kreita en Moravio. Li petis, ke nia movado helpu disvastigi informojn pri la komponaĵo, eventuale helpu trovi novajn informojn pri la aŭtoro mem. Ni jam helpis per artikolo en Viki. Pliajn informojn petu ĉe:

[Z.Smiricky@seznam.cz](mailto:Z.Smiricky@seznam.cz)

## La 17-a Esperanto-tago en Pardubice

okazis la 25-an de junio 2011 en agrabla nova restoracio *U jezera* (Ĉe la lago). Kvankam en junio okazis kelkaj Esperanto-aranĝoj, tamen partoprenis 44 personoj el 18 lokoj de Ĉeĥa Respubliko.

Post bonvenigo de la partoprenantoj ludis kaj kantis kelkajn kantojn kvarmembra



familio de eksmembrino de la E-klubo. Sekvis raportaĵo de tri AEH-membroj vojaĝintaj en Skandinavio. Videobildoj kun vorta akompano de iliaj travivaĵoj fare de Kvído Janík proksimigis al ni ilian trisemajnan privatan vojaĝon.

Poezio, prezentita de Margit Turková, kaptis atenton certe de ĉiuj ĉeestantoj, same kiel interesaj informoj pri la „hejma teatro“, kiu funkciis en ŝia loĝejo en Obořiště dum multaj jaroj kaj en kiu iam

eminente aktoris Eva Seemannová (danke al ŝia dramaturgo Ĉestmír Vidman).



Ankaŭ interesajn informojn prezentis Martina Zlatohlávková pri la loka urba teatro kaj ĝiaj artistoj.

La literaturan konkurson pri temo „Mia plej granda aventuro, kiun mi neniam forgesos“ partoprenis 14 esperantistoj. La ĵurio premiis la plej bonajn per libroj. Kelkaj verketoj estas publikigitaj en suplemento de la gazeto Informilo de AEH.

Ni ricevis multajn informojn pri la agado de E-kluboj, de E-muzeo en Svitavy, pri planataj renkontoj, sed ankaŭ pri tiuj, kiuj jam sukcese estis realigitaj. La renkontiĝo finiĝis per promeno ĉirkaŭ la rivero Chrudimka al centro de la urbo. La organizantoj jam ricevis reeĥon de kelkaj anoj, ke ili estis kontentaj.

*J. Rýznarová*





## 44-a ILEI-konferenco Kopenhago, 17-23 julio 2011

La konferenca temo estis **Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado**. Aliĝis 83 personoj el 31 landoj, el Ĉeĥio Marek Blahuš.

En la konferenco estis traktataj temoj *Flugiloj de interkultura vento, Projekto 125, Kiel enkonduki Esperanton en universitatojn, Universitata kaj scienca agado, Kiel informi pri Esperanto kaj respondi al ĵurnalistoj, La indonezia Esperanto-movado* k.s. Marek Blahuš prezentis la agadon de la teamo E@I (kun Peter Baláž) kaj prelegis pri *Kontribuo de komputila lingvistiko al solvado de lingvaj problemoj en scienca komunikado kaj edukado*.

Okazis diskutoj pri la kongresa temo, ke instancoj ĝenerale konsentas, ke ĉiuj homoj rajtas internacie komuniki, sed en la praktiko tiun rajton ĝuas nur tiuj, kies gepatra lingvo estas monda. Kiel Esperanto povas kontribui al plenumo de tiu rajto en la sfero de scienca komunikado?

La projekto 125 aludas la venontan jaron 2012, kiam pasos 125 jaroj ekde publikigo de Esperanto en Varsovio. Laŭ propono de polo Stanislaw Rynduch oni aranĝu en multaj landoj 125-tagan kurson de Esperanto. La kurso komenciĝu la 23-an de marto 2012 (printempa ekvinkso).

### Informa Komisiono de UEA

konsistas el Marek Blahuš (Ĉeĥio), Andrej Grigorjevskij (Rusio) kaj Francesco Maurelli (Italio/Britio), kaj komisiito por rilatoj kun Internacia Normiga Organizaĵo ISO kaj la terminologia informejo Infoterm, por kiu tasko oni elek-

tis Mélanie Maradan (Svislando). En la Amerika Komisiono Alberto Calienes (Kubo) fariĝis kunordiganto anstataŭ Rubén Diaconu (Argentino).

*Laŭ Gazetara Komunikado de UEA*

## UEA AKTIVIS ĈE UN-KONFERENCO

Kvin reprezentantoj de UEA (Marcus Cramer, Stefano Keller, Mélanie Maradan, Julia Noe kaj Manfred Westermayer) partoprenis la ĉi-jaran Konferencon de Neregistaraj Organizaĵoj, kiun la Departemento pri Publika Informado (DPI) de Unuiĝintaj Nacioj okazigis en Bonn (Germanio) de la 3-a ĝis la 5-a de septembro 2011 kun la temo *Daŭrigeblaj socioj - respondecaj civitanoj*.

La teamo de UEA aktive diskonigis la starpunktojn de UEA pri lingvaj rajtoj, komentante i.a. tion, ke nur la angla estis laborlingvo de la konferenco. La ĉefino pri la rilatoj de UN kun NRO-j, respondis, ke tion kaŭzis nur manko de mono.

Jam komence de la konferenco estis publikigita malneta projekto de la fina deklaro, pri kiu la ĉeestantaj NRO-j povis komenti kaj fari proponojn pri ŝanĝoj kaj aldonoj. La teamo de UEA proponis aldonon de frazoj pri lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj. La lastan tagon oni prezentis la kune finverkitan deklaron de la konferenco, en kiu tamen mankis la mencioj pri lingvaj rajtoj proponitaj de UEA. Maradan protestis.

Dokumentoj, videoj kaj fotoj pri la konferenco:

<http://www.linguistic-rights.org/eventoj>  
*(Laŭ la raporto de Stefano Keller.)*



## Polaj junaj esperantistoj en Česká Třebová

Vendrede la 10-an de junio 2011 venis al Česká Třebová geknaboj el Pollando sub gvido de estrino Teresa. Atendis ilin Zdenka Novotná, kiu venigis siajn esperantistajn infanojn.



Sabate ĉiuj kune veturis al kampadejo Vochtánka sub Potštejn, kie ili rostitis kolbasetojn, vidis turnirojn de mez-epokaj kavaliroj kaj padelis en rivereto Divoká Orlice (Sovaĝa Aglino).



Dimanĉe la grupo rigardis la urbon kaj vizitis ekspozicion de kaprompiloj en Kulturcentro. Lunde en lernejo de Opatovec lokaj infanoj prezentis al la

gastoj malgrandan spektaklon. Pri la okazaĵo informis la urba informilo.



## Esperantistoj en Nitra



Renkontiĝon de esperantistoj en Nitra la 27-an de majo 2011 partoprenis ankaŭ klubanoj de *Amikeco* el Česká Třebová.

*Zdenka Novotná*

## Nacia „abilimpiado“

De la 27-a ĝis la 28-a de majo 2011 la granda sporthalo ĈEZ-areno en Pardubice apartenis al la 19-a nacia „abilimpiado“, konkursaj ekspozicioj, laboraj kaj hobiaj kapabloj kaj rutinoj de personoj kun diversa tipo kaj grado de handikapeco.



119 konkursantoj en 22 disciplinoj (ekzemple: korbfarado, floraranĝado, ornamado de paskovoj, desegnado de afiŝoj, ceramiko) montris, ke handikapo ne devigas ilin sidi hejme senfare. Ili ne nur konkursis, sed pli grave estis, post unu jaro denove renkontiĝi kun siaj geamikoj, almenaŭ por mallonga tempo.

La tuttagan programon kompletigis dum ambaŭ tagoj ankaŭ pluaj interesaj program-aranĝoj. Denove tie ne mankis ekspozicio de novaĵoj el la fako de korp-terapia kaj kompensa helpiloj, vendado de produktoj de handikapuloj, kiuj laboras en specialaj laborejoj, aŭ prezento de trejnado de hundoj, kiuj helpas kaj akompanas ĉaretulojn aŭ blindulojn.

Estis granda intereso ankaŭ pri telestiritaj miniaturaj kamionoj, danco kun glavo kaj serpento, komuna baletprezentado de rulseĝuloj kaj irantaj dancantoj. Ĉiu povis provi faldadon de

paperobjektoj laŭ pramalnova japana metodo — origami, tiaj artaĵoj ofte estas nekredeblaj. „Abilimpiado“ estas unu el aktivecoj, kiujn preparas la Ĉeĥa Abilimpia Asocio por personoj kun handikapo. Pli detalajn informojn en la ĉeĥa lingvo pri ties agado vi povos trovi en interreto ĉe: [www.caacz.cz](http://www.caacz.cz).

Venontjare okazos la jubilea 20-a nacia „abilimpiado“ en la tagoj 25.-26.5. 2012. Ĉiuj estas elkore invitataj jam nun de la redaktoro de „abilimpiada“ bulteno de Miloš Kajzrlík.

Elĉeĥigis J.Rýznarová

## Kinofestivalo kaj lupino

Ĉe <http://vimeo.com/kinofestivalo> estis proklamita kinofestivalo de amatoraj esperantlingvaj videoj. Inter 25 kontribuoj estas ankaŭ unu ĉeĥa, nome el Pardubice **Amy kaj stelo**. La familio Kosnar instigis sian lupinon Amy ĉirkaŭkuri Esperanto-stelon.



La brazilaj organizantoj sukcesis tiamaniere kolekti kelkajn interesajn ŝercojn kun esperantaj temoj.

-mm-



## Rememore pri UK-oj en Prago

Antaŭ 90 jaroj, inter la 31-a de julio kaj la 6-a de aŭgusto 1921 okazis en Prago la 13-a mondkongreso de Esperanto, kiu estis samtempe la 7-a de UEA, ĉar nur future ili kunfandiĝis.



Sume 2561 partoprenantoj el 36 landoj kongresis en palaco Žofín sur la Slava insulo de la rivero Vltava (Vultavo, Moldavo), sed la inaŭguro okazis en Komunuma Domo, kie en la mezepoko staris reĝa domo de Venceslao la IV-a. La inaŭguran paroladon prezentis d-ro Stanislav Kamarýt. Dum la kongreso estis fondita Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kies honora prezidanto fariĝis franca verkisto Henry Barbusse. En la kongreso partoprenis ankaŭ japana diplomato Nitobe Inazo, ĝenerala vicprezidanto de Ligo de Nacioj, kiu tre favore raportis pri la okazaĵo. En la ĉefa salono estis eksponita busto de Zamenhof farita de Emanul Kodet — la busto nun apartenas al Urba Muzeo en Česká Třebová kaj estas eksponita en Esperanto-muzeo en Svitavy. Ĉefa teatraĵo estis komedio de Jaroslav Vrchlický en traduko de tiam 24-jara Miloš

Lukáš sub titolo Nokto en Karlův Týn.

Nia dua UK okazis en Prago en 1996, do antaŭ 15 jaroj, inter la 21-a kaj 26-a de julio, en la Kongresa Palaco.



Dum ĉi tiu nia kongreso estis akceptita Praga Manifesto, realiĝis Nitobe-seminario pri lingva demokratio, aperis rekordaj 11 numeroj de la kongresa kuriero Pragaj Sonoriloj kaj la dokumentoj de la kongreso aperis en la retejo de UEA, kie la interesatoj trovas ilin ĝis nun. Partoprenis 2972 kongresanoj.



Kiel teatraĵoj estis prezentitaj spektakloj pri la vivo de Zamenhof kaj komedio de Goldoni *La gastejestrino* kaj libroforme aperis teatraĵo de Václav Havel *Aŭdienco*.

-mm-



## Muzea nokto en Svitavy

La 4-an de junio 2011 okazis muzea nokto en Svitavy. La urba muzeo malfermis sian deponejon kun stoko de malnovaj lavmaŝinoj, gramofonoj kaj televidiloj, kiujn la vizitantoj normale ne povas vidi. En la muzea korto estis preparita metiejo pri fiŝlagoj, kiun akompanis ekspozicio de fiŝoj, vivaj kaj ankaŭ mumiigitaj, kaj de remburitaj akvobirdoj.



Ankaŭ nia Esperanto-muzeo partoprenis. En nia salono estis inaŭgurita nova ekspozicio **Spiritaj tradicioj de la mondo kaj Esperanto**. Sekvis prelego de Petro Chrdle Spiritualeco de la Ekstrema Oriento, filmoj pri religioj kaj komuna kantado de mantroj.



Vespere jam tradicie venis al la Otten-dorfer-domo, en kiu troviĝas nia muzeo, aktora grupo de lokaj gimnazianoj, kiuj por la publiko prezentis spektaklon pri la vivo kaj verko de Valentin Oswald Ottendorfer, usona mecenato, kiu naskiĝis en Svitavy, kiel knabo devis forkuri al Usono, kie li riĉiĝis kaj konstruigis multajn malriĉulejojn kaj malsanulejojn.

Li rememoris sian naskiĝurbon en la tiama Aŭstrio kaj konstruigis tie ne nur malsanulejon kaj malriĉulejon, sed ankaŭ bibliotekon, la plej belan konstruaĵon en la urbo. Ĝi kolektis 23 mil germanlingvaj librojn, kies plejparto perdiĝis dum la dua mondmilito. Ĝuste pri la inaŭguro de la biblioteko en 1892 rakontis la spektaklo prezentita en la koncertejo super nia muzeo.



Parto de la spektaklo estis vizito de la biblioteka turo, kie hantis malgranda fantomo kun ardantaj okuloj. La spektaklo estis plurfoje ripetita, por ke ĝin vidu ĉiuj interesatoj.

El la iama biblioteko restis nur 6 mil libroj, troviĝantaj nun en la muzea deponejo, kaj anstataŭ ili troviĝas nun en la biblioteko libroj esperantlingvaj kun ekspozicio pri Esperanto-kulturo.

*Fotoj EK Svitavy*

# SPIRITAJ TRADICIOJ DE LA MONDO KAJ ESPERANTO

jen la nomo de nia nova (jam 5-a) tutjara ekspozicio, inaŭgurita kadre de la Muzea Nokto la 4-an de junio 2011.



Intenco de la nova ekspozicio estas prezenti al la publiko la Esperanto-movadon kiel komunumon plurisman, ideo malferman kaj aktive tolereman, elirantan el la filozofia koncepto de homarismo de d-ro Zamenhof. La ĉefa devizo de la ekspozicio estas la eldiro „**LA VERO ESTAS LIBRO, KIUN NENIU EL NI ANKORAŬ FINLEGIS**“. Ĝi ne estas esprimo de troa relativigo de valoroj, sed konscio pri nia natura homa limigiteco dum kontemplado pri esenco kaj senco de nia vivo, preteco daŭre serĉi, aŭskulti, lerni unu de la alia, havi reciprokajn estimon kaj respekton al alikredantoj kaj koncentriĝi ĉefe pri tiuj pensoj kaj valoroj, precipe tiuj de agema amo kaj reciproka afableco, kiuj unuopajn instruojn unuigas.

La paneloj konatigas la vizitantojn kun tiuj religiaj, aŭ ĝenerale spiritaj kaj filozofiaj instruoj kaj movadoj, kiuj ha-

vas en la Esperanto-movado sian reprezentigon – t. e. havas siajn organizojn, eldonas esperantlingve librojn, gazetojn, organizas aranĝojn ktp. Krom diversaj branĉoj de kristanismo (inkl. kvakerismo) estas ĉi-tie reprezentitaj unitarismo kaj unitara universalismo, bahaa kredo, spiritismo, budhismo kaj ŭonbulismo, Oomoto kaj Kosmologio de Martinus.



Temas precipe pri malfermaj kaj ankaŭ por t.n. nekredanoj ofte ideo inspiraj instruoj – krome pri kelkaj el ili en multaj naciaj lingvoj ne estas sufiĉe da informoj. En librovitrinoj estas prezentataj ekzemploj de riĉa eldona agado de Esperanto-organizoj pri la spiritaj temoj. En la aktualigita daŭra ekspozicio pri Esperanto ĝenerale estis kreita ankaŭ nova panelo „Filantropio kaj Esperanto“, kie vi povas ekscii pri rotaria movado kaj Legio de Bona Volo.






La ekspozicio krome ofertas artikolojn kaj informpublikaĵojn en la ĉeĥa kaj Esperanto pri unuopaj instruoj por surloka studado, mallongajn videofilmojn en tuŝekrano kaj ankaŭ ion por infanoj – mandalojn kaj aliajn spiritemajn bilde-tojn por kolorigado kaj ankaŭ specialajn por tiu ĉi celo kreitajn puzlojn kun kristanaj, hinduismaj kaj aliaj temoj. Kaj fine de la trarigardo vi povas krome elpreni kaj kiel memoraĵon kunporti kor-varmigan t.n. „mesaĝon de anĝeloj“ ...



**FOTOGALERIO** el la inaŭguro kaj de la ekspozicio estas rigardebla ĉe: <http://muzeum.esperanto.cz/eo/galerio/15-5-vystava-5-a-ekspozicio.html>.



Por membroj de la socia retejo *Ipernity* (post la senpaga registriĝo) estas desti-nita ankaŭ aparta albumo *Spiritaj tradi-cioj*, kie estas koncentrataj plejparte arti-koloj aŭ tutaj libroj por tiuj, kiuj volas studi la unuopajn spiritajn instruojn iom pli profunde.



Ĉeĥa Esperanto-Asocio ne havas finan-cojn por pagata deĵoranto, tial ĝenerale necesas anonciĝi en la kaso de la urba muzeo en konstruaĵo vid-al-vide trans la ŝoseo (marde ĝis vendrede 9-17h kaj semajnfine 13-17h), aŭ se vi kiel ekster-landanoj deziras esperantlingvan akom-panon, prefere antaŭe skribi mesaĝon al [muzeagrupo@esperanto.cz](mailto:muzeagrupo@esperanto.cz) aŭ telefoni al +420 606 605 374.

*Fotoj EK Svitavy*





## ĈEĤA ESPERANTO- JUNULARO AKTIVAS

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) travivas someron riĉan je eventoj: Julio ekis per unutaga enlanda renkontiĝo "Kun kuniklo tra tubo" en Kralupy nad Vltavou en ĉeesto de 5 personoj. Du semajnojn poste en Kievo komenciĝis la 67-a IJK, kiun partoprenis 7 ĈEJ-anoj (Barbora Závodská, Miroslav Hruška, Jaroslav Gennert, Martin Bureš, Karol Rydlo, Stanislav Štoček, Daniel Mrázek), el kiuj kelkaj ankaŭ la postkongreson en Krimeo. En la samtempe en Olomouc okazanta 77-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj reprezentis ĈEJ Marek Blahuš, kiun akompanis francino Salomé Hug. Poste li ĉeestis ankaŭ la 44-an ILEI-konferencon kaj la 96-an UK en Kopenhago. Tiujn aranĝojn sekvis Somera Esperanto-Studado (SES) en Nitra (Slovakio), kiun el Ĉeĥio vizitis 6 junuloj (inkluzive de novulo Miloš Havlíček el Třešť) kaj ankaŭ kelkaj pliaĝuloj.

Daniel Mrázek ligis kontakton kun la Esperanto-klubo en Pardubice kaj fine de junio dum ĝia 17-a Esperanto-Tago prezentis tie pri ĈEJ. Similan prezenton faris Miroslav Hruška en la klubo de Brno la 21-an de majo okaze de ties 110-jariĝa festo. Jam aprile li tie prelegis pri sia vojaĝo al Francio. Sammonate li aranĝis prelegon de Pavel Lehký el la asocio E-lingvo en kurso pri "Tutmondiĝo kaj regionigiĝo" ĉe la Mendel-Universitato en Brno. Komence de junio Miroslav Hruška kaj Vít Mišurec ĉeestis la muzean nokton en Svitavy. Revuo Týdeník Rozhlas aperigis reagon (en n-ro 19/2011) de Barbora Závodská al

artikolo de psikologo Zbyněk Vybíral kun titolo "Esperanto (ne)vzdělaných?" (en n-ro 11/2011 aŭ ĉe

<http://tinyurl.com/eovybiral>).

Miroslav Hruška ekde julio faras 3-monatan staĝon en Partizánske (Slovakio) ĉe la organizo [E@I](http://e@i), helpe de la EU-programo ERASMUS (kun kunstaĝantoj el Francio kaj Hispanio), simile kiel antaŭe en Francio Marek Blahuš. Tiu intertempe magistriĝis pri informadiko kaj ekde oktobro staĝos dum 5 monatoj ĉe la ĝenerala direktorejo por interpretado de la Eŭropa Komisiono en Bruselo. En junio li renkontis esperantistojn en Pollando kaj Slovakio, kaj la 10-an de julio aranĝis kunvenon de tri eksterlandaj esperantistoj kiuj tiam sekvis en Ĉeĥio kursojn de la ĉeĥa lingvo (Salomé Hug el Francio, Geir Langård el Norvegio, Robert Budzul el Aŭstralio). Komence de aŭgusto li helpe de stipendio kiel unu el kelkaj esperantistoj ĉeestis la tutmondan vikipedian renkontiĝon Wikimania en Hajfo (Israelo) kaj renkontis ankaŭ lokajn esperantistojn. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>.

*Marek Blahuš*



*Marek Blahuš prelegas al blinduloj*

# HAŜEKOLOGIA KONFERENCO

La 9-an de junio 2011 la ĉeĥa Unio de Interpretistoj kaj Tradukistoj kunlabore kun Ambasadato de Pola Respubliko kaj loka oficejo de Ĝenerala Direkcio por Tradukoj de Eŭropa Komisiono organizis en Prago konferencon, kies celo estis rememorigi la 100-an datrevenon de „Partio de Modera Progreso en la Limoj de Leĝo“, kies fondinto estis Jaroslav Hašek.

La konferencon salutis Inĝ. Richard Hašek, nepo de la verkisto, kiu nin informis, ke tiu ĉi (fikcia) Partio ankoraŭ vivas, havante en sia emblemo la sloganon „En kiom da partioj vi estas membro, tiomfoje vi valoras kiel homo“. Per la eldiro li enigis inter la aŭskultantaron bonan humoron kaj emon por gaja humuretosoj – ĝuste kiu taŭgas por tiatema traktado, kiun gvidis la fama tradukisto el la rusa – **Milan Dvořák**.

Ĉeestis ĉirkaŭ sesdeko da interpretistoj kaj tradukistoj, kiuj aŭdis prelegojn de kelkaj eminentaj hašekologoj, oni povas specifi ke „ŝvejkologoj“, ĉar spite la ĉeftemon, oni ĉefe traktis la koncernan faman verkon de J.H.

**Prof. Antoni Kroh**, verkisto kaj aŭtoro de la lasta traduko de „Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk“ en la polan.


**Prof. d-ro Jacek Baluch**, literaturhistoriisto, tradukisto, prezidanto de Pola-ĉeĥa Scienca Societo, membro de pola kaj de ĉeĥa PEN-kluboj, aŭtoro de la traduko, en la polan, „Historio de Partio de Modera Progreso en la Limoj de Leĝo“.

**Prof. Sergio Corduas**, estro de katedro de la ĉeĥaj lingvo kaj literaturo en la

venecia universitato Ca' Foscari, fekunda tradukisto de ĉeĥaj literaturaĵoj en la italan.

**D-ro Radko Pytlík, CSc.**, la ĉeĥa eminenta fakulo pri la Hašek-verkaro. Li parolis pri fenomeno „Ŝvejk kiel artisma bildo“.

**Michal Staša**, kiu legis abundajn humorajn fragmentojn el la verkaro de J. Hašek.



**Inĝ. Margit Turková** – ŝi prezentis la prelegon „Hašek kaj Esperanto“, por kiu materialon preparis Jiří Patera, kiu ankaŭ partoprenis la konferencon. M. T. povis „fieri“ pri du libroj, kiuj estis tradukitaj de ĉeĥaj esperantistoj – nome la „Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk“ kaj la „Ne nur soldato Ŝvejk“. Tiu ĉi dua estas kolekto da 37 rakontoj de Hašek, havas kelke da tradukantoj kaj estas redaktita de Miroslav Malovec.

M. Turková mallonge informis pri eldonejo KAVA-PECH kaj pri interesiĝo de la tutmonda esperantistaro pri Hašek-verkaro. Tion ŝi demonstris sur la traduklaboro de fama esperantisto – japano Kurisu Kei. Inter la aŭskultantaro oni sentis vekitan intereson pri tiu ĉi bohemiisto, kolegian sentemon pro sinturmentado pri tradukaĵoj.

M. Turková precipe citis la Kurisu-eldiraĵon, „sen esperantistoj mi ne kapablas traduki literaturaĵojn (ne nur ĉeĥajn) en la japanan“. Tion pruvis kelkaj trafe elektitaj „specimenoj“ el abundaj leteroj, kiujn Kurisu interŝanĝis kun aliaj esperantistoj: plej abundis tiuj kun Vlastimil Kočvara, Jiří Patera, Miroslav Malovec. Nek tiuj nomoj, nek aliaĵoj estis prezentitaj, pro mallonga tempo. Jiří Patera porokaze presigis, en kelkaj ekzempleroj, la ĉeĥan-Esperantan „Počáteční program Strany... („La komenca programo de la Partio...“). Volonte ĝin akceptis prof. Corduas kun vortoj, ke li ĝin tradukos en la italan.

Lastvice Jiří P. transdonis al Radko Pytlík la propramane skribitan, por li destinitan skribaĵon de Kurisu Kei, plenumante ties deziron. Sed tiu kortuŝa ago okazis intime, inter nur koncernataj personoj – Jiří Patera, Radko Pytlík kaj Kurisu Kei... Ankaŭ tiaj detaloj faris la konferencon agrabla kaj fruktodona.

*Margit Turková, 10. 6. 2011*

## **TORPEDo-7**

**30.9.-4.10.2011 Herzberg am Harz**

### **1. Internacia simpozio**

Esperantaj eduk- kaj kulturcentroj, muzeoj, bibliotekoj, projekto PUNTO

### **2. Cseh-metoda lingvo-kurso**

*zsofia.korody@esperanto.de*

*http://esperanto-urbo.de*

### **Rimarkigo:**

PUNTO (Partner-Urba Nodo-Teksaĵo) - projekto por krei reton de partneraj urboj kunlaborantaj per Esperanto.

## **NOVA ADRESARO DE PASPORTA SERVO**

La ĉi-jara adresaro de Pasporta Servo enhavas 1087 gastigantojn en 672 urboj en 90 landoj. En la 188-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj k.a. informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri iliaj loĝlokoj. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo. La adresaro estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. La prezo estas 9,00 EUR plus afranko (plus imposto de 6% en EU). Ekde 3 ekz. oni ricevas trionan rabaton.

*GK de UEA*

## **Semajna interreta televido**

La Esperanto-movado de Meksiko estigis televidan programon parolatan en Esperanto. Ties nomo estas Me-Info, mallongigo de Meksika Esperanto-Info. La elsendoj okazas per interreto, ĉiuvendrede je la 2:00 UTC, ĉe la adreso <http://www.telecentral.com.mx/casts/meinformo/programas.html>. Redaktas kaj prezentas la programon lernantoj de Esperanto-kursoj de la urbo Aguas Calientes.

*Ret-Info*

## **Esperanto-kafejo**

En la ĉefstrato de urbo Herzberg estas malfermita **Esperanto-kafejo** (kun ofertado de ginsenga kaj aligustaj teoj kaj kelkaj kukospecoj) en la korto de la domo de lokaj entreprenistoj gesinjoroj Schicke. Ili uzas menukarton kaj varbŝildon sur la dommuro en Esperanto.

*Ret-Info*



## Frazaro Tatoeba

La frazokolekto Tatoeba ĵus atingis milionon da frazoj, el kiuj 94.107 estas en Esperanto, kiu plu tenas la trian lokon rilate al la nombro de frazoj, post la angla kun 194.311 frazoj kaj la japana kun 157.487 frazoj. La frazoj de la kolekto Tatoeba, <http://tatoeba.org>, estas iom post iom tradukataj al intertempe 93 lingvoj, el kiuj unu estas Esperanto. La ideo estas havi ne nur vortaron, kiu donas la tradukon por unuopaj vortoj, sed havi la tradukon de kompletaj frazoj por kompreni la vorton en natura ĉirkaŭaĵo.

*Ret-Info*

## Elektronikaj libroj de Sezonoj

Ĉe la retejo de la eldonejo Sezonoj eblas senpage elŝuti kelkajn novajn elektronikajn librojn, nome *Palto* de N. V. Gogol, *Naskiĝo de la rustimuna ŝtalrato* de H. Harrison, *Blankaj noktoj* de F. Dostojevskij, *La falo de la domo Usher* de E. A. Poe, *Sveda alumeto* de A. Ĉeĥov, kaj *La pika damo* de A. Puŝkin: <http://esperanto.org/Ondo/Libro/Libroj/Libroj.php>

*Ret-Info*

## TED, tamen ne teda

TED (*Technology Entertainment Design / Teknologio, Amuzo, Fasonado*) estas usona fondaĵo kreita en 1984 por disvastigo – per prelegoj senpage spekteblaj – de ideoj interesaj kaj utilaj por la tuta mondo. Vastega estas la temaro: scienco, arto kaj fasonado, politiko, edukado, kulturo, aferoj, tutmondaj demandoj, teknologio, disvolviĝo kaj amuzo.

Jam dudeko el la ĉirkaŭ 800 prelegoj havas subtekstojn en Esperanto. Bonvena estos kunlaboro de interesatoj por kreado de subtekstoj por ceteraj prelegoj. Adreso por E-lingvaj filmo-prelegoj: [www.ted.com/translate/languages/epo](http://www.ted.com/translate/languages/epo)

*Ret-Info*

## Distanca, reta studado

Internacia Studejo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) en Bydgoszcz – Klerigejo de Akademio Internacia de la Sciencoj AKB/AIS decidis dum 2011/2012 gvidi ankaŭ eksterĉeestan, do retan studadon de turismo, kulturo kaj lingvoj. Oni povas diplomiĝi ĉe ISTK, krome bakalaŭriĝi kaj magistriĝi ĉe AIS, el sia hejmo. Studadkotizoj estas: 350 EUR/USD. Pliajn informojn vi trovas ĉe: [www.esperanto-studium.za.pl/](http://www.esperanto-studium.za.pl/).

## Novaj libroj

(Libroservo de UEA)

- **Esperanto: komenco, aktuala kaj estonteco.** Aktoj de la 33-a Esperantologia Konferenco en la 95-a Universala Kongreso de Esperanto, Havano 2010. Prezo: 15.00 EUR.
- **Tertrema katastrofo de Japanio 2011,** Taglibro. Jasuo Hori, Legolibroj, MAS / SAT, 2011. Pli ol simpla taglibro! Prezo: 14.10 EUR.
- **La sojlo de la spirita mondo, Aforismaj prezentoj.** Rudolf Steiner, Filozofio, W. Nüesch, 2011. Prezo: 3.90 EUR.
- **Beletra Almanako 11,** (Junio 2011). Miksita literaturo, Mondial, 2011. Prezo: 9.90 EUR.
- **Internacia Kongresa Universitato 2011,** Kopenhago, Danio, 23-30 julio 2011. Scienco kaj tekniko, UEA, 2011. Prelegoj. Prezo: 15.00 EUR, triona rabato ekde 3 ekz.
- **Origino de la vivo sur la Tero,** Nikolao Gudskov, Scienco kaj tekniko, Impeto, 2011. Atentokapta poplarscienca verko. Prezo: 8.10 EUR.

# GRAVA ŜTATA ORDENO AL ETSUO MIYOSHI

La 30-an de junio 2011 en la Esperanto-placo de la Parko de la Mondo en Malborko persone transprenis fama japana entreprenisto, esperantisto kaj subtenanto de Esperanto Etsuo Miyoshi ŝtatan kavaliran ordenon de la pola ŝtatestro Bronislaw Komorowski. La oficiala kialo estis „pro disvastigo de la pola kulturo“.

Mian retan gratulmesaĝon li respondis tre modeste: „Kara Petro, koran dankon pro via laŭdo. Tio estas rezulto ne nur de mia klopodo, sed ankaŭ de via laboro. Kaj multegaj homoj precipe en Euxropo helpis agadi. Tion Pollando nun agnoskas. Atentigi gravulojn pri nia movado estas mia fina celo. Kore, Etsuo.“



Sur la foto Etsuo Miyoshi kun filino babilanta kun mi en la Movada Foiro en

Jokohamo.

Ni deziru, ke la daŭra populariga agado de Etsuo rilate Esperanton havu multajn sekvantojn kaj ke ni ĉiuj havu lin kiel nelacigeblan modelon de laboremo kaj modesteco.

*Petro Chrdle*

## Mia nova hundido

Pasintmonate mi aĉetis novan hundidon. Bojaro, la ido de hungara leporhundo. Ĉar mi estas komencanto, ankaŭ Esperant-ido, kaj mi bezonas paroli Esperante, mi decidiĝis instrui al ĝi la komandojn ankaŭ Esperante

„Sidu, kuŝu, al gambo, restu, alportu, sur la ejon... ktp.“

Mi supozas, ke mia Bojaro estos la unua hundo en Eŭropo, eble en la tuta mondo, kiu komprenos Esperante.

Sed mi ne scias, ĉu estos ebleco anigi ĝin en ĈEA.

*Max Kaŝpariŭ*

## Signály pri Esperanto

Ĉu vi konas retejon Signály kun ĉeĥlingva informilo pri Esperanto?



<http://esperanto.signaly.cz/>



# Nova Verda Stacio

Ĉe la adreso <http://www.verdastacio.eu/> aperis provo revivigi la intermilitan radiostacion Verda Stacio, kies centro estis en Brno kaj post la milito en Prago ĝis 1951, kiam ĝi estis nuligita. Ni deziru al ĝia fondinto Paŭlo – tiel li nomas sin – sukceson, por kiu li bezonas ankaŭ helpantojn kaj ĉefe aŭskultantojn. Nun troviĝas tie kvar elŝuteblaj sonregistraĵoj kiel eksperimenta provo.

-mm-



## Retradio VERDA STACIO

[www.verdastacio.eu](http://www.verdastacio.eu) serĉas kunlaborantojn, amatorajn aktorojn, kantistojn kaj muzikistojn.

Ni bezonas homojn kiuj povas prezenti sin en niaj elsendoj ekde la aĝo de 6 jaroj ĝis – ne gravas...

**Vi povas labori en via hejmo per interreto!**

Ni serĉas:

\* **Por A-kategorio:** kontrolantoj de la lingvo Esperanto, tradukistoj por esperantigi teatraĵojn aŭ kantojn, dramaturgoj, reta programisto.

En tiu ĉi kategorio skribu al:

[pably@centrum.cz](mailto:pably@centrum.cz)

\* **Por B-kategorio:** amatoraj aktoroj, kantistoj kaj radiomoderatoroj.

En tiu ĉi kategorio sendu mesaĝon kaj sonregistraĵojn en formato mp3 al:

[pably@centrum.cz](mailto:pably@centrum.cz)

1. Unu kanto laŭ via volo je daŭro de 1 minuto kaj grandeco ĝis 250 MB

2. Unu prezentado de poemo je daŭro de 1 minuto kaj grandeco ĝis 250 MB

3. Unu libere elektita parto de teatraĵo aŭ romano parolita je la daŭro de 1 minuto kaj grandeco ĝis 250 MB.

\* **Por C-kategorio:** muzikistoj

En tiu ĉi kategorio sendu mesaĝon kaj mp3-sonregistraĵojn kun via laboro al [pably@centrum.cz](mailto:pably@centrum.cz) je daŭro de 1 minuto kaj grandeco ĝis 250 MB.

Ne forgesu en la letero mencii vian nomon, aĝon kaj ĉu vi parolas Esperante bone aŭ ne. Por kategorioj B kaj C vi devas havi interreton kaj komputilon hejme, skype kaj facebook.

Ne gravas, se vi ne havas hejme bonkvalitan diĝitan sonregistrilon. Por elektitaj aktoroj ni ĝin poste povas pruntedoni aŭ donaci.

Ne hezitu kaj aliĝu, por ke ni povu prezenti en nia radio pli bonajn kaj abundajn programerojn .

*Saluton de Iveta, Rosto kaj Paŭlo*



## Malaperanta lago

En transkaspia Turana ebenaĵo troviĝas Arala lago, tra kiu kuras limo de Kazahio kaj Uzbekio. Ankoraŭ antaŭ nelonge ĝi estis la kvara plej granda lago de la mondo — post Kaspia maro, amerika Supera lago kaj afrika Viktoria lago — sed ĝia areo tiel malgrandiĝis, ke nun ĝi estas nur la sesa, ĉar ĝin superis Hurona kaj Miĉigana lagoj. Ĝia areo laŭ indiko el la jaro 1956 estis 63 300 km<sup>2</sup> (+ areo de la insuloj 2 258 km<sup>2</sup>), en la jaro 1971 oni indikis 60 000 km<sup>2</sup>, en la jaro 2003 nur 37 500 km<sup>2</sup> kaj en la jaro 2005 eĉ nur 33 640 km<sup>2</sup>, do preskaŭ nur duonon de la iama areo.

Maksimuma profundo estis 68 m, nun ĝi estas 51 m, meza profundo estis 20-25 m, tial nun plurloke aperas senakviĝinta fundo. Sekve de malaltiĝo de la nivelo je 17 m, pligrandiĝis la insuloj kaj aperis novaj; la norda parto de lago apartiĝis kaj tiel kreis novan lagon, kies kazahlingva nomo estas *Caqsiqi liŝ kōli*.



Arala lago situas sur la rando de la dezerto Kizilkumo. Tra la dezerto fluas al ĝi du riveroj: Sirdarĵo kaj

Amudarĵo. En la tempo de soveta reĝimo tie estis konstruitaj multaj akvoliveraj kanaloj, kiuj ĉerpas akvon el riveroj en dezerton kaj ŝanĝas la dezerton en florantan ĝardenon, sed sekve de tio tiel malgrandiĝas traflukvanto de la riveroj, ke ili ne atingas lagon, ĉar ili finiĝas en dezerto. Nur Sirdarĵo de tempo al tempo lagon atingas, sed ĝi nun enfluas en la novan malgrandan lagon, ne en la Aralan.

Uzbekia parto de Arala lago troviĝas en aŭtonoma Karakalpaka Respubliko. Plimulto de la karakalpaka nacio suferas sekve de terura akvomanko. La lago situas en la regiono de ekstreme arida enlanda klimato, kies someraj temperaturoj apartenas al la plej altaj en la mondo. Tial elvaporado de ĝia akvo estas tre intensa kaj ĉar aflukvanto de la akvo al ĝi estas nun ofte preskaŭ nula, estas evidente, ke ĉi tiun lagon atendas sorto de multaj aliaj lagoj en la mondo, kiuj malaperis kaj post kiuj nur restis ofte tre ampleksaj areoj kovritaj per dika krusto de salo. Malaperon de Arala lago ege rapidigas la homoj.

*Lubomír Středa*



*Ŝrumpado de Aralo inter 1960 kaj 2008 laŭ Vikipedio*

## KORDIS en Esperanto

Kordis estas oficejo de *Integrata publika transporta sistemo de la Sudmoravia regiono* en Brno. Danke al studento Miroslav Hruška tie nun troviĝas informo ankaŭ en Esperanto por la eksterlandaj turistoj: [www.kordis.cz](http://www.kordis.cz), elŝutebla el: [www.kordis.cz/kestazeni/TipEsperanto.pdf](http://www.kordis.cz/kestazeni/TipEsperanto.pdf)

## Filmo pri Esperanto

Fama usona reĝisoro Sam Green produktis dokumentan filmon pri Esperanto. Ĝi titoliĝas "The Universal Language" (La Universala Lingvo). Tiu filmo, interalie, malfermis la unuan Esperantan Kinofestivalon. Sam Green planas produkti DVD-on kaj ŝatus tradukigi la 35-minutan filmon en multajn lingvojn. La jam prizorgataj lingvoj estas Esperanto, la hispana, portugala, ĉeĥa, rusa, franca kaj tokipono (artefarita filozofia lingvo de Sonja Elen Kisa, 2001).

Aleksander Osincev  
skajpo: alex-kaoru  
[alex.osintsev@gmail.com](mailto:alex.osintsev@gmail.com)

## Honora Doktoreco

Merkredo la 28-an de septembro 2011 estis destinita por transdoni al Max Kašparů honoran doktorecon el la manoj de rektoro de „Akademio de Sankta Elizabeta“ en Bratislava.

## Konferenco de Ĉeĥa IFEF-sekcio

okazos en Rakovník inter la 30-a de septembro kaj la 2-a de oktobro 2011 en Cafex Tenis Centrum.

## Retaj bibliotekoj

Bretaro, Bitoteko, Tekstaro, Sakura estas kelkaj el esperantlingvaj retaj bibliotekoj, kie vi povas senpage trovi kaj elŝuti al via komputilo esperantajn librojn, kiel legaĵon por vi mem aŭ por viaj kursanoj. Ankaŭ la usona projekto Gutenberg, kiu kolektas ĉefe la anglalingvan literaturon (preskaŭ 30 mil verkojn), proponas centon da libroj en Esperanto. La madrida Bitoteko simile kiel la viena Esperantomuseum proponas malnovajn librojn kaj gazetojn kiel fotoĵojn, la ceteraj virtualaj bibliotekoj en rekompostita formo. Tra la reto ekzistas miloj da privataj retejoj kun esperantlingva literaturo, tial Bitoteko alvokas al kunlaboro por krei riĉan libron kapablan konkurenci kun aliaj lingvoj. Jen kelkaj adresoj:

<http://bitoteko.esperanto.es>

<http://www.bretaro.net>

<http://www.vastalto.com/librejo/>

<http://tekstaro.com/>

[http://www.gutenberg.org/wiki/Esperanto\\_\(Bookshelf\)](http://www.gutenberg.org/wiki/Esperanto_(Bookshelf))

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>



*Ekzemplo de elektronikaj libroj, unu kiel fotoĵo, alia rekompostita.*



## ŜANĜO DE LA ĈEFDELEGITO de UEA por ĈEĤIO

12 jarojn plenumis la funkcion de la ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio tre bone Lucie Karešová, tamen ekde ĉi tiu jaro okazis ŝanĝo kaj la funkcion transprenis mi, la ĝisnuna redaktoro de la ĈEA-retkomunikoj Petro Chrdle, [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz). Do en la aferoj ligitaj al UEA (individua membreco, abono de periodaĵoj eldonitaj de UEA kaj TEJO, delegita reto, informoj kaj aliĝiloj al universalaj kongresoj, ktp) bonvolu kontakti min. Mi volas ĉi-okaze publike danki (certe ankaŭ nome de la ceteraj individuaj membroj de UEA) al Lucie por perfekta plenumo de la funkcio kaj promesi, ke mi strebos ĝin plenumi same respondece kaj bone kiel faris ĝis nun ŝi.

*Petro Chrdle*

## Adiaŭo de la malnova kaj bonvenigo de la nova redaktoro

La 9-an de aŭgusto 2011 aperis la lasta numero de **ĈEA-retkomunikoj**, kiujn preparis mi, la iniciatinto kaj la unua redaktoro. Mi tenis la principon, ke retinformoj raportu precipe pri la estontaj okazaĵoj, ne pri tiuj, kiuj jam pasis, ĉar raportoj pri tiuj pli taŭgas por la presita organo de ĈEA Starto. Ununura escepto estis la rubriko „Ĉeĥa Esperanto-junularo aktivas“, ĉar male ol ĈEA, ĈEJ ne posedas sian oficialan organon kaj do laŭ la interkonsento kun la ĈEJ-komitato la ĈEA-retkomunikoj servis samtempe kiel oficiala organo de ĈEJ – kaj verŝajne tiel restos ankaŭ estonte.

Nun mi transdonas la redaktadon al Miroslav Hruška, al kiu mi deziras bonajn kunlaborantojn kaj atentajn legantojn. Do ekde nun bv. direkti viajn kontribuadojn, same kiel informojn pri eventualaj ŝanĝoj de via retadreso, al li: [miropiro2312@gmail.com](mailto:miropiro2312@gmail.com).

*Petro Chrdle*

## Esperanto-kongreso de ĈEA

Ne forgesu, ke de la 7-a ĝis la 9-a de oktobro 2011 okazos en distrikta urbo Ŝumperk (Norda Moravio, submontaro de Jeseníky) Kongreso de ĈEA, dum kiu estos interalie elektitaj novaj skipoj de funkciuloj, kiuj gvidos nian asocion dum la venontaj 3 jaroj. Dum la kongreso oni diskutos kaj aprobos ankaŭ novajn statutojn kaj elektoregularon de ĈEA, do evidente la persona ĉeesto de la membroj estas tre grava. Krom tiu laborprogramo okazos lingvaj kaj fakaj seminarioj, gvidata trarigardo de la urbo kaj riĉa vespera kultura programo.

## VIKIMANIO = Internacia vikipediista renkontiĝo

Vikimano estas unika internacia renkontiĝo de kontribuantoj al esperanta Vikipedio omaĝe al ĝia dekjariĝo. Ĝi okazos en Svitavy de la 26-a ĝis la 30-a de oktobro 2011. La partoprenantojn atendas prelegoj, seminarioj, laborgrupoj, instrulecionoj por komencantoj, kultura programo, ankaŭ urbotrarigardo kaj ekskurso al ĉarma proksima renesanca urbo Litomyšl troviĝanta en la Unesko-listo de kulturheredaĵoj. Detalajn informojn vi trovos ĉe

<http://www.vikimano.estranky.cz/>  
aŭ skribu al [evikimano@gmail.com](mailto:evikimano@gmail.com)

## Projekto Postcrossing – Poŝtkrucirado

Ĉu vi scias, kio estas Postcrossing? Tio estas la projekto ĉe interreto, kiu ebligas, ke homoj ricevu bildkartojn (realajn, ne virtualajn) de multaj aliaj interesantoj el la tuta mondo. Ĝi funkcias laŭ la principo: Se vi sendos bildkarton, vi ricevos bildkarton de alia partoprenanto de la projekto. La projekto troveblas: <http://www.postcrossing.com/>.

Bedaŭrinde, la partoprenantoj skribas plejparte en angla lingvo, sed oni skribos ankaŭ en alia (neangla) lingvo al tiuj, kiuj parolas saman lingvon. Ŝanco por Esperanto. Mi liveras ĉe miaj retpaĝoj al ĉiuj iujn bazajn informojn pri instrukcio kaj pri reguloj de la projekto. Vizitu: <http://www.verdastelo.kokesh.cz/projekt.html>. Pri la projekto vi ricevos informojn en la ĉeĥa lingvo ĉe: <http://www.postcrossing.com/about/CZ>

*Jiří Pěnek*

## Nova libro de Max Kašparů

*Pri vagaj cirkloj kaj vagaj ŝtonoj* estas verkita ĉeĥlingve, sed enhavas dediĉon *La libron mi dediĉas al miaj esperantistaj gamikoj* kaj estis prezentita dum sankta meso en Brno la 15-an de aŭgusto 2011 antaŭ plenplena preĝejo, kiu aŭdis mencion pri Esperanto.

Poste multaj homoj aĉetis ĝin kaj ricevis subskribon de la aŭtoro.



## Esperanta rondo Montetaro Pelhřimov

393 01 Pelhřimov № 2006 ♣ tel. 565321232 ♣  
[pelhrimov@esperanto.cz](mailto:pelhrimov@esperanto.cz)

La rondeto estis fondita oktobre 2010 fare de Max Kašparů, kiu ankaŭ gvidis kurson de Esperanto. En majo 2011 la rondeto aranĝis ekspozicion *Ĉu Esperanto estas morta lingvo?* en la urba biblioteko de Pelhřimov. La klubo plue eldonis dulingvan infanlibron *La fabelputeto de panjo / Maminčina pohádková studánka* de Kamila Bártlová-Lampířová el Okříšky apud Třebíč. Temas jam pri tria eldono de fabelo, kiu gajnis duan premion de H. Ch. Andersen en 2000.



La libron akompanas belaj ilustraĵoj.

# KALENDARO

## Kalendaro 2011

**2011-10-07/09** Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Šumperk.

Info: [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz), [Tomecek@esperanto.cz](mailto:Tomecek@esperanto.cz)

**2011-10-15** Desegnado kun Pavel Rak en E-muzeo Svitavy. Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

**2011-10-15** Postferia renkontiĝo en Putim

**2011-10-26/30** Vikimanio de vikipediistoj en Svitavy Info: [evikimanio@gmail.com](mailto:evikimanio@gmail.com)

**2011-12-10** Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek (AnkRo). Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

## Kalendaro 2012

**2012-07-10/15:** La 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Opava kun la ĉeftemo „Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj“. Info: [Eva.Kopečna@ivax-cz.com](mailto:Eva.Kopečna@ivax-cz.com)

**2012-07-14/20:** Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy. Tutsemajna aranĝo kun la temo „Sciencfikcia literaturo kaj robotoj“ kaj ĝia turisma antaŭprogramo en Prago 2012-07-08/14. Info: [www.kava-pech.cz](http://www.kava-pech.cz) aŭ [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

**2012-07-27-08/12:** Flugkaravano al Vietnamio lige al la 97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo. Info: [www.kava-pech.cz](http://www.kava-pech.cz) *Vietnamio* aŭ [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

**2012-09-13-16:** La 6-a kongreso de AEH-IKEH (handikapitaj esperantistoj) en ripozdomo Štíří důl u Krucemburku (Skorpia valo ĉe Krucemburk. Info: [ae-h-ikeh@volny.cz](mailto:ae-h-ikeh@volny.cz)

**2012-09-27/30:** Trilanda konferenco - Komuna konferenco de aŭstraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Info: [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) aŭ [komitato@esperanto.cz](mailto:komitato@esperanto.cz)

**2013-julio:** Flugkaravano al Islando lige al la 98-a Universala Kongreso de Esperanto. Antaŭintereson neniukaze sindevigan bv. sendi al [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)



## Voĉo de Zamenhof

Se vi volas aŭdi la aŭtentan voĉon de L. L. Zamenhof, vizitu la retejon de Carlos Divizia, kiu post klarigo, kiajn teknikajn problemojn li devis solvi, lasas paroli nian Majstron en relative bona kvalito:

<http://www.youtube.com/watch?v=VT3Z0hVfW44&nofeather=True>

## M. I. Isajev (1928-2011)

La 20-an de junio 2011 en Moskvo forpasis eminenta Sovetunia kaj Ruslanda lingvisto, profesoro Magomet Izmajloviĉ Isajev (1928-2011), konata fakulo pri iranaj lingvoj (precipe pri la oseta), pri sociolingvistiko kaj pri interlingvistiko. Dum 1979-1989 li prezidis la Asocion de Sovetiaj Esperantistoj (ASE).

*Ret-Info*

## Historiaj gazetoj rete

Aŭstra Nacia Biblioteko en Vieno publikigas en sia retejo, en subfako de planlingvoj, historiajn esperantistajn gazetojn inkluzive de *Časopis českých esperantistů 1908-1914*. Aperas tie ankaŭ *Cosmoglotta* kaj *Kosmoglott* de okcidentalo. Vizitu la retejon:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>.

## Miroslav Smyčka 85-jara

La 11-an de septembro festas nia fama kantisto sian naskiĝtagon. Ni gratulas kaj deziras ankoraŭ multajn koncertojn!



## Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Další pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete L. Hýblové seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

### Upozornění

#### pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

## Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, [cea.polnicky@quick.cz](mailto:cea.polnicky@quick.cz). Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

### POZOR: změna PŘEDPLATNÉHO!

**Monato**: 1020,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 610,-Kč

**La Gazeto**: 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto**: 520,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 310,- Kč.

**Juna Amiko**: 240,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5

**Literatura Foiro**: 940,- Kč (\*620,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

**Heroldo de Esperanto**: 1020,- Kč (\*680,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

**Femina**: 630,- Kč (\*420,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

**Litova Stelo**: 260,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

\*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

**Periodikum Českého esperantského svazu - 42. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789  
62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,  
tel. 774 928 974**

**Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2011**

-----  
**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
42-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj, ekster Eŭropo  
13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, malovec@volny.cz**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero:  
15.11.2011**

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

## **Wikipedio 150 000**

Esperantlingva interreta enciklopedio Wikipedio jam superis 150 mil artikolojn, tial ŝanĝiĝis ankaŭ ĝia simbolo. Vidu

<http://eo.wikipedia.org>.



## **Tri jaroj de nia muzeo**

Esperanto-muzeo en Svitavy estis inaŭgurita antaŭ 3 jaroj la 20-an de septembro 2008.